# *Vizitas kuba prezidento produktivajn centrojn en Santiago de Kubo*



**Foto: PL**

Santiago de Kubo,  apr 11 (RHK) La prezidento de Kubo, Miguel Díaz-Canel, hodia? vizitis entojn en la santiaga municipo Contramaestre por taksi ?ian evoluon kaj kontribui al la ser?ado de solvoj al la problemoj de la teritorio.

Kune kun la Sekretario de Organizo de la Komunista Partio de Kubo, Roberto Morales, la ?tatestro komencis sian turneon de la Bieno Ceba América, kreita anta? 27 jaroj.

La prezidento eksciis, ke tiu ?i centro ne povas plenumi sian planon de ses milionoj da aleidoj pro la malbona stato de la lagetoj.

La Granja efektivigas vastan investan procezon, kiu kovras siajn 14 lagetojn, kaj kvar jam fini?is.

Kadre de la turneoj bazitaj sur la prioritatoj de la lando kaj lokaj problemoj, Díaz-Canel atingis du decidajn entojn en la eksportplanoj: la kafo kaj mielpretigfabrikoj, apartenantaj al la kompanioj BioCubaCafé kaj Apicuba, respektive.

Ekde la komenco de la jaro, la kuba prezidento faris plurajn turneojn tra la municipoj de la lando por kontroli laborprioritatojn kaj atingi teritoriojn kun malfacila?oj kaj kontribui al ilia solvo.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/351980-vizitas-kuba-prezidento-produktivajn-centrojn-en-santiago-de-kubo

Radio Habana Cuba